# SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE S.A.T.
http://satesperanto.free.fr/ *** retadreso: satesperanto@free.fr

## 1-A DE MAJO




Foto : Staou, http://www.phototheque.org/

Majo 2006 77-a jaro, n-ro 5 (1211)
MENSUEL / MONATA
ISSN 1163.0442 Prezo: 5 €

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

# Unua de Majo memorigas ke laborista lukto - klasbatalo - daŭras



## Koreio

### Problemoj de korea sindikata movado
#### Mia sperto pri kamionista laborsindikato en Koreio

Mi laboris en korea kamionista laborsindikato ekde Julio en 2003. Mia sindikato estas tutlanda kaj havas 20.000 membrojn. En Majo 2003, kamionistoj strikis por plibonigi malbonan laborkondiĉon. Korea registaro




*Manifestacio de koreaj laboristoj*

promesis ke ĝi eventuale akceptos la postulojn de kamionistoj la 15an de Majo. Sed la promeso ne realiĝis. Do laboristoj komencis pli grandan strikon en Aŭgusto. Tamen registaro tuj enĵetis batalpolicon kaj perforte disigis laboristojn en strika manifestacio. La registaro arestis aŭ sendis arestleteron al pli ol 50 partoprenantoj en striko. Post striko ĉirkaŭ 1.500 laboristoj estis forĵetitaj el siaj entreprenoj.

Oni diras ke kamionistoj estas ‘sendependaj laboristoj’ aŭ ‘speciale dungitaj laboristoj’ en Koreio. Same kiel instruistoj de lernopaperaj kompanioj, varbantoj de asekuraj kompanioj, ludhelpantoj en golfejoj, k.a. Fakte ili estas subordaj de entrepreno (kapitalistoj), tamen laŭ leĝo ili tute ne havas 3 laboristajn rajtojn (rajto de unuiĝo, rajto de grupa negoco, rajto de grupa agado). Sekve, eĉ se ili troviĝas en ia ajn maljusta situacio, ili ne havas rajton striki. Kaj antaŭe kapitalistoj pagis monon por aĉeti necesaĵojn por laboro (ekzemple: kamiono, oleo, ktp), tamen nuntempe kamionistoj devas aĉeti ĉion mem. ILO (Internacia Labor Organizo) eble enkondukos konsilan proponon por garantii rajtojn de speciale dungitaj laboristoj venontan Junion.

Eĉ ĝis nun, 3 jarojn post la interkonsento inter kamionistoj kaj registaro, laborkondiĉoj de kamionistoj ne boniĝis, male, malboniĝis.

La 10an de Septembro 2005, mia sindikata membro ‘KIM Dongjun’ sin bruligis. Li kriis mortante ke “Mi ne povas vivi pro la tro multkosteco de oleo, tro multe da ŝuldo kaj maljusta juĝpreno de miaj havaĵoj!”. Tio estis vere mizera afero! La registaro donis subvenciojn al kamionistoj por rekoni ke la frajtado estas publika afero, sed registaro denove juĝprenis subvenciojn de sinjoro KIM, ĉar li ne povis pagi impostojn pro tro multaj ŝuldoj. Antaŭe li jam promesis per memorando ke li iom post iom pagos ĉiujn impostojn al administracio de impostaj aferoj, tamen la administracio malvarme juĝprenis liajn havaĵojn. Post tiu ĉi afero, pli ol 2 membroj sin mortigis per pendigo sur siaj kamionoj.

Pro tiuj aferoj, miaj sindikataj membroj tre koleriĝis, kaj ili decidis strikon kun pli ol 70% aprobo de membroj per voĉdono. Kamionistoj postulis: ‘Garantiu la rajtojn de laboristoj ankaŭ al speciale dungitaj laboristoj!’, ‘Trovu rimedojn por vivteni malgraŭ troa multkosteco de oleo!’, ‘Plibonigu sistemon de frajtado!’, ktp. Sed estraro de mia sindikato




*Kamionistoj*

prokrastis strikon por negoci kun registaro. Finfine ili retiris strikon, organizante voĉdonon pri nerealigota registara plano, kvankam la plano ne enhavis promesojn por plibonigi laborkondiĉojn kaj garantii bazan rajton de la laboristoj.

Kio estas la kialoj de ĉi tia afero?
Unue, estraro de la sindikato timis subpremadon de registaro kaj iuj estraranoj rilatis sekrete kun registara partio.
Due, estraro de la sindikato neglektis sindikatan internan demokration. Do ili pensis ke estraro memdecide povas ŝanĝi decidon de membroj.
Trie, laborsindikata movado estas fariĝinta parto de la reĝima sistemo. Sekve laborsindikata karaktero ŝanĝiĝis al rimedo por kontroli forton de popolamasaj bataloj, inkluzive laboristojn.

Aktuale en Koreio historie ŝajnas ke ne nur FKTU (angle FEDERATION OF KOREAN TRADE UNIONS; Federacio de Koreiaj Laborsindikatoj) sed ankaŭ KCTU (angle KOREAN CONFEDERATION OF TRADE UNIONS; Korea Konfederacio de Laborsindikatoj) estis inkludita efektive en reĝimo. FKTU estis historie federacio de registaro, tamen KCTU estis simbolo de memstareca unueco de laboristoj antaŭe. Ĉar nun KCTU ankaŭ ne bone reflektas interesojn de neperfekte dungitaj laboristoj kaj maldungitaj laboristoj, k.a. Mi konsentis kun laboristoj, kiuj pensis ke la estrara nuligo de striko estis maljusta. Kaj ili protestis ĉe estraro de mia sindikato. Tial, laŭ mia konscienco, mi devis rezigni mian laboron, ĉar mi estis propagandisto de mia sindikato kaj ne povis pravigi la maldemokratian decidon de estraro.



*KIM Dongjun*

Post rezigno, ekde lastajara decembro ĝis ĉijara marto, mi travojaĝis 13 landojn (Ĉinio, Rusio, kaj Eŭropaj Landoj). Survoje mi renkontis multe da SAT-kamaradoj. Inter ili, renkontiĝo kun k-do Jakvo Schram en Belgio, k-do Daniel en Francio, k-do Andrea en Italio donis kredon al mi ke interpopola solidareco povos helpi en la tutmonda laborista movado. Interalie k-do Jakvo Schram rakontis al mi historion pri laborista movado de diamanta fabriko en Antverpeno. Kaj mi sentis ke la eniro al reĝimo kaj apostato de estraro de laborsindikata movado estas monda problemo.

Nun mi pensas ke la laborista solidareco trapasanta landlimon estas necesa por venki novliberalisman tutmondan sistemon kia nuntempa kapitalismo. Kaj mi kredas ke la rimedo por venki la sistemon, kiu dresas eĉ batalemajn laborsindikatojn aŭ maldekstrajn partiojn kiel malsuperan partneron de kapitalo, estas tutmonda konekto kaj plivastigo de laboristaj spontaneaj bataloj. Lastatempe francaj laboristoj elĵetis signokuglon por plivastigo de tutmondaj bataloj per venki, por nuligi malbonan leĝon ‘CPE’, ĉu ne?

Paz (Korea Respubliko) paze23@gmail.com)

## EL LA REDAKTEJO...



*Karaj,*
*La tempo rapide pasas kaj vi jam legas la majan numeron de Sennaciulo. Kiel vi povas konstati, en tiu ĉi numero partoprenas pluraj gekamaradoj el diversaj landoj kaj kontinentoj.*
*Mi persone kontaktis ilin kun peto verki ion okaze de la maja numero. Ili afable akceptis kaj verkis la artikolojn. Do mi dankas al ili. Sed, estus tamen pli bone se vi spontanee kaj aŭtomate verkus kaj sendus la materialon al la redaktejo por ke mi ne devu daŭre serĉi la tekstojn kaj puŝi vin al kunlaboro. Vi certe sekvas la socialan kaj politikan vivon en viaj landoj kaj regionoj. Kiam okazas io grava, informu la aliajn pere de Sennaciulo. La venontaj temoj por la rubriko "Aktuala diskuttemo" estas laŭvice la jenaj: a) Militservo kaj ni", b) Edukado kaj naciismo". Viajn kunlaboraĵojn sendu al rubrikredaktoro: Ando Viola Murasaki, Nomachi 2-1-13, JP-921-8031 Kanazawa. rete: violoiv@infoseek.to. Dankon.*
*Dezirante al vi ĉiuj agrablan printempon kamaradece salutas vin, via*

*Redaktoro*


Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Retadreso: satesperanto@free.fr.
TTT-paĝoj: http://satesperanto.free.fr
Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
IBAN: FR 77 30041 00001 0123422K020 39
BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA : **satx-s**
Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin, Viola, C. Orsingher, Snajpero, I. Moĉilnik kaj K. Barkoviĉ.
Ĉefredaktoro : Krešimir Barkoviĉ
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.
❒
Imprimé par : TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER
Abonnement annuel/jara abono France 55 €.
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution.
N° CPPAP 0510 G 86567
Limdato por ricevo de kontribuaĵoj estas ĉiam la 10-a en la monato.


# MAJA TAGO - BATALO-TAGO?

Ĉiun jaron denove la plejmulto de la monda laboristaro festas 1-an de majo … ĉu vere?

En la jaro 2000 la itala pensulo Antonio Negri kaj la usona literatursciencisto Michael Hardt aperigis la tezon *"Empire"*, verko de du verkantoj kiuj sin ornamis per la titolo komunisto. Ili substrekis sian fidon en la estontecon kaj volis montri la pozitivajn elementojn kiuj troviĝas en la komunisma idearo.

Negri kaj Hardt skribis ke ni nun estas



*Antonio Negri*

en la tempo de *Empire* kaj la tempo de imperiismo pasintas. La tezo diras ke la laborista klaso malaperis el la vido kaj strukturoj kiel sindikatoj estas sen valoro nek havos signifon plu. Ankaŭ la tempo de la revoluciaj partioj estas pasita, ĉar retaj-organizoj transprenis la rolon de centralizitaj kaj disciplinigitaj strukturoj. Mondvasta *reto de potenco* transprenis la rolon de naciŝtatoj. En ĉi tiu nova mondo la socialaj klasoj ne plu ekzistas, sed la mondo estas reto da singularaj individuoj. Kune ili estas *la amaso* predikas Negri kaj Hardt.

Fausto Bertinotti prezidanto de Eŭropa Maldekstro proponis modernigon de la marksismo!? La historia rolo de de laborista klaso devas esti rekonsiderata kaj ankaŭ, li konkludas, ke la rolo de revoluciaj partioj plene senutilas.

Ŝajnas ke en la malnova Eŭropo kreskas du malsamaj fluoj, kiuj volas revizii la marksismon. Grava fluo en la centro estas la *Alternativa Tutmonda Movado* kaj aliflanke la komunistaj grupoj kiuj pro manko de intereso de la 'amaso' klopodas trovi sistemon kiu devas plifortigi denove la komunismajn politikajn partiojn. Sed demando estas ĉu ni devas plifortigi politikajn partiojn aŭ ĉu ni devas plifortigi mondan solidarecon?

La diversaj *klasbatalaj kaj revoluciaj partioj* jam montris ke ili ne havas intereson en mondaj agadoj sed preferas grimpi sur la ĉaron de naciismo kaj regiona protekto de laborlokoj. Ĉiu en propra regiono (mi nun parolas pri la *klasbatalaj kaj revoluciaj partioj)* havas buŝon plenan pri internaciismo, solidareco ktp, sed je momento de la vero ili elektas esti regiona, nacia, en plej bona kazo Eŭropa partio, kiu defendas por la necesaj voĉoj de la balotantaro, luktojn en regionaj strukturoj. Nur politika partio kiu fajfas pri la 'potenco' povas fari sennacian, mondan, internacian batalon kiu favoras rekte la salajrulojn, aŭ la laboristan klason, sed problemo estas kie troviĝas ĉi tiuj politikaj partioj?

"Pensu monde, agadu loke" estas la slogano de la *Alternativa Tutmonda Movado*, sed kio signifas loka agado. Ĉu agadi por la rajtoj de kolegoj en foraj landoj kiuj ne jam havas la avantaĝojn kaj protektojn de socialaj rajtoj, necesaj por havi minimuman protekton kontraŭ la kapricoj de la kapitalismo? Aŭ ĉu loka agado signifas vere nur, agadi por



*Fausto Bertinotti*

la kvartalo aŭ regiono. Kiu miksas siajn agadojn ene de lokaj grupoj kun agadoj en progresema maldekstra asocio kiel ekzemple en SAT, konstatas ke ambaŭ luktoj postulas aliajn agadmanierojn. Ne malfacilas havi sukceson je loka nivelo, sed atingi iun mondan agadon preskaŭ ne eblas, almenaŭ ne por asocio kiu petas al la membroj uzi ekzemple Esperanton kiel laborlingvon. Tamen, se la laboristaro ne nur komprenis ke monda solidareco necesas por havi pli komfortan, pli kontentigan vivnivelon, sed ankaŭ konstatis aŭ komprenas ke iu universala lingvo utilas la interkompreniĝon, ni jam metas gravan paŝon antaŭen.

Fari diskuton pri propra estonto, pri homaj